J.P.J. EDITOR

GRUPO PRI FILOZOFIAJ, SCIENCAJ KAJ TEKNOLOGIAJ ESPLOROJ – IFPR

KUNORDIGO PRI PUBLIKAĴOJ

REVUO IΦ-*SOPHIA*

PUBLIKA ALVOKO - ARTIKOLOJ

Ĝenerala TEMO: Politika filozofio: civitaneco kaj socia kontrolo.

TEMARO: Teorioj de Lingvo; Pedagogoj; Currículo; Historio de Politiko en Antikva tempo; Historio de Antikva Edukado; Historio de Politiko en la Mezepoko; Historio de Edukado en la Mezepoko; Politika Historio en la Renaskiĝo; Historio de Edukado en la Renaskiĝo; Politika Historio en la Moderna Aĝo; Historio de Edukado en la Moderna Aĝo; Nuntempa Politika Historio; Historio de Edukado en la Nuntempa Aĝo; Politiko; Filozofio de Edukado; Filozofio; Filozofio de Lingvo; Etiko; Bioetiko; Historio de Filozofio; Historio de Politika Teknologio; Antropologio de Politiko; Sociologio de Politiko; Historio; Historio de Ideoj; Historio de mensogoj; Psikologia Historio; Edukado; Pedagogoj pri la instruado de Sociaj Teknologioj aplikitaj al Politiko; Instruado Praktiko; Lernado Takso; Politika Esploro; Distanco Lernado; Projektoj de Interveno; Politikaj Sistemoj; Sistemoj de Edukado de Politiko; Sistemoj de Teknologia Instruado; Majstro Trejnado; Arkaika Greka Politiko; Politika Scienco.

LIMDATO DE LA SUBMETO: 09/04/2018

PRI LA REVUO

- Kontakto: Poŝta adreso – *Grupo de Pesquisas Filosofia, Ciência e Tecnologias – IFPR - Instituto Federal do Paraná – Av. Cívica, 475 – Centro Cívico – Assis Chateaubriand – Paraná – Brazilo – CEP.: 85.935-000 retejo – www.grupodepesquisafilosofiacienciaetecnologiasifpr.com*
- Ĉefa respondeculo: Prof-o M-o **José Provetti Junior**
  Retadreso – jose.provetti@ifpr.edu.br
  Tel-o: 44-98813-1127

Eldonisto: José Provetti Junior – IFPR – Asisŝatobriano – Brazilo.

Eldona Komisiono:

- Cláudia Dell'Agnolo Petry – IFPR – Assis Chateaubriand – Brazilo.
- Vicente Estevam Sandeski – IFPR – Curitiba – Brazilo.
- José Provetti Junior – IFPR – Assis Chateaubriand – Brazilo.

Eldona Konsilantaro:

- Cláudia Dell'Agnolo Petry – IFPR – Assis Chateaubriand – Brazilo.
- Vicente Estevam Sandeski – IFPR – Curitiba – Brazilo.
- José Provetti Junior – IFPR – Assis Chateaubriand – Brazilo.
- Daniel Salésio Vandresen – IFPR – Coronel Vivida – Brazilo.
- Michelli Cristina Galli – IFPR – Assis Chateaubriand – Brazilo.
- Luiz Fernando Dias Pita – UERJ – Rio-de-Ĵanejro/AERJ – Rio-de-Ĵanejro – Brazilo.
- Ivan Eidt Colling – UFPR – Curitiba – Brazilo.
- Leandro Neves Cardim – UFPR – Curitiba – Brasil.
- Rodrigo Brandão – UFPR – Curitiba – Brasil.
- Paulo Vieira Neto – UFPR – Curitiba – Brasil.

Politikoj

Fokuso kaj celaro:

La revuo publikigas originalajn sciencajn artikolojn de profesoroj, esploristoj, studentoj kaj civitanoj el ĉiuj terenoj de konado, ekde el la Baza, Teknika kaj Teknologia Edukadoj kaj ekde je Bakalaŭreco ĝis la Specialecoj *lato* kaj *stricto sensu*.

Pluralisma, la **Revuo IΦ-*Sophia*** rifuzas ajnan ideologian aŭ politik-partian enkadrigon. La akademia debato ne povas esti aŭtenta kaj dinamika, se ĝi estas katenita de la politika kaj ideologia strabecoj de tiuj, kiuj imagas sin sinjoroj de la vero en ebur-kasteloj. **IΦ-*Sophia*** prenas sur sin la taskon konverti neniun, nek sin direktas nur al “konvertitoj”.

Ni komprenas, ke la realeco estas pli kompleksa ol la antaŭjuĝoj, kaj tiuj ĉi ne

estas fertilaj terenoj por la demokratia debato malferma al novaj perspektivoj en la mondo, kiu postulas transirigi la konvencian pensadon.

La libereco de esprimado kaj la demokratia pluraleco malhavas antaŭjuĝojn kaj dogmojn. Estas necesaj kuraĝo kaj komuna klopodo tiurilate, kaj por kritiko kaj por memkritiko, kaj ankaŭ por ke oni estu ĉiam preta interŝanĝi ideojn kaj polemiki.

Tio ne signifas, ke la individuaj politikaj-ideologiaj sintenoj esprimas la kolektivon de la Revuo. Ni ne estas politik-partia kaj/aŭ sindikata organizacio. Ni same ne akceptas monolitan pensadon, jen dekstreman, jen maldekstreman.

La monda realeco postulas poziciiĝojn. Kritika teorio ne estas vere kritika, se ĝi asertas, ke ĝi havas sciencan neŭtralecon.

IΦ-*Sophia* ne vehiklas tekstojn rasismajn, seksismajn aŭ ofendajn al la homoj. Ĝi karakterizas sin per etika principo, kiu povas reduktiĝi al du vortoj, nome: **intelekta honesteco**, tio estas, la kompromiso de ĉiuj, kiuj kunlaboras kun tiu ĉi spaco de pripensado, konservi la integrecon de la kritika esplorado, sen ia ajn konsento al interesoj je partia aŭ ideologia trajto aŭ je limigite aparta socia senco.

Misio

Surbaze de ĉio supre dirita, la revuo **IΦ-*Sophia*** havas la jenajn celojn:

1. Diskonigi la kritikan pripensadon pri la akademia kampo, la politiko kaj la ĝenerala socio, laŭ plureca kaj demokrateca perspektivoj;

2. Kontribui por fortikigi la interligojn inter la formalaj medioj de la scienca konado kaj la sociaj medioj kaj movadoj ekster la akademia komunumo;

3. Ebligi la publikan registradon de la konado kaj ĝian konservadon;

4. Dissemi la informaron kaj la konadon generitajn de la scienca komunumo kaj for de ĝi;

5. Plirapidigi la procezon de scienca komunikado;

6. Kontribui por la dissolvo de la pozitivisma antaŭjuĝo pri aparteco inter Filozofio kaj Scienco;

Takso-Procedo de la revumembroj:

La artikoloj estos taksataj de la Eldona Komisiono de la Revuo; se ili estos aprobitaj, ili estos senditaj al la takso de la konsilianoj. Post necesaj korektoj kaj eblaj proponoj, la artikolo estos akceptita por publikigo, se ĝi havos unu favoran takson; sed ĝi estos rifuzita, kiam du taksoj estos malfavoraj. Okaze de unu favora takso kaj de unu alia malfavora, la decido pri la publikigo aŭ ne de la artikolo estos de la Eldona Konsilio de la Revuo. La takso estos blinda, tio estas, ĝi ne identigos la aŭtorojn nek iliajn respektivajn kunlaborantojn, nek ankaŭ la eksterajn taksantojn, tia sekreteco estos observata en ambaŭ flankoj.

Politiko pri libera alirado:

Tiu ĉi Revuo ebligas rektan aliradon al sia enhavo, sekvante la principon, ke, disponigi sciencan konadon al la publiko senpage, ebligas pli grandan mondan demokratecon de la konado.

Submetoj:

La artikoloj devos esti senditaj per retpoŝto, al la retadreso jose.provetti@ifpr.edu.br, laŭ la kriterioj establitaj en la Direktivoj al la Aŭtoroj.

Direktivoj al la Aŭtoroj:

1. Estos akceptitaj por submeto artikoloj senditaj per elektronika poŝto al la retadreso jose.provetti@ifpr.edu.br, ĝis la limdato de la alvoko por artikoloj, antaŭe disanoncita per la retejo de Grupo Pri Filozofiaj, Sciencaj kaj Teknologiaj Esploroj – IFPR kaj/aŭ per aliaj rimedoj de propagando kaj popularigo de la landaj kaj alilandaj filozofiaj, sciencaj kaj teknologiaj scioj.

2. La Revuo publikigas originalajn artikolojn pri ĉiuj terenoj de la konado.

3. La aŭtoroj devos informi, ĉu la teksto estas tute nova, tio estas, ĉu ĝi

jam ne estis antaŭe publikigita.

4. La artikoloj kiuj estos konformaj kun la **“Direktivoj al la Aŭtoroj”** kaj kun la **kondiĉoj de submeto**, estos senditaj por antaŭa analizo de la Eldona Komisiono de la Revuo.

5. La artikoloj akceptitaj de la Eldona Komisiono estos senditaj por la takso de la konsilistoj *ad hoc* de la Revuo.

6. La proceduroj de analizo kaj takso de la artikoloj far la fakopiniantoj okazos kun la anonimeco de la aŭtoroj de la respektivaj laboraĵoj kaj de la fakopiniantoj (“blinda takso”). Do, **ne identigu vin en la korpo de la teksto nek en la proprecaj informoj de la dosiero**. Inkluzivu **biografian noton**, kiam vi submetos la artikolon, en la tekstejon mem de la elektronika poŝto.

7. La laboraĵoj submetotaj devas sekvi la jenan modelan strukturon:

a) La artikoloj devos esti, preferinde, je unu sola aŭtoreco;

b) Ne estos akcepitaj artikoloj je pli ol du aŭtoroj;

c) **Ne estos akceptitaj submetaĵoj kun kunaŭtoreco, en kiu unu aŭtoro estas akademia orientanto de la dua;**

d) La artikoloj povos esti submetitaj en la portugala, hispana, angla, franca aŭ en la Neŭtrala Internacia Idiomo – Esperanto;

e) La artikoloj devos ĉirkaŭhavi: resumon (je ĝis 500 vortoj), ŝlosil-vortojn (ĝis 5), *abstract*, *key words* (kunrespondaĵojn en la lingvo, en kiu la teksto estis skribita) kaj bibliografiajn referencojn. Ĉiuj artikoloj havos sian *abstract* tradukitan al la Neŭtrala Internacia Idiomo – Esperanto, pri kio respondecos la eldonisto;

e) La resumo (same kiel la *abstract*) ne superu 500 vortojn kaj enhavu koncizajn informojn pri la artikolo. Ĝis kvin ŝlosil-vortoj devos aldoniĝi ĉe la fino, kaj en la resumo, kaj en la *abstract*, kiuj ne estos menciitaj en la titolo;

f) La artikoloj **ne devos transpasi la limon de 15 paĝoj da tajpita teksto**, kaj de 20 paĝoj post la inkluzivo de bildoj, tabeloj kaj bibliografiaj referencoj. **La interlinia spaco devos esti 1,5cm. Devos utiliĝi la litertipo *Times New Roman*, grando 12, sur paĝoformato A4. Ĉiuj marĝenoj de la teksto (supra, malsupra,**

dekstra kaj maldekstra) devos havi 3cm. La dosiero devos esti sendita en formato "doc" aŭ en alia de simila tekstoprilaborilo;

g) Bildoj, grafikaĵoj kaj ĝeneralaj ilustraĵoj devos esti **senditaj aparte**, en **formato JPG aŭ GIF, kaj ili estu plej eble malpezaj** (laŭ Kb). La aŭtoro devos informi, kien en la tekstokorpo ili estu metitaj.

h) **La piednotoj devos havi celon nur eksplikan;**

i) La **bibliografiaj citaĵoj** devos sekvi la jenajn ekzemplojn, kiuj bazas sin sur la normoj de ABNT. **Por cito en la teksto**: uzu la familian nomon kaj la jaron – Ekz.: Caporalini (2005) aŭ (CAPORALINI, 2005); **pri du aŭtoroj** – Ekz.: Veiga kaj Santos (2008) aŭ (VEIGA; SANTOS, 2008); **pri tri aŭ pli da aŭtoroj**, menciu la unuan kaj apude skribu *et al*. – Ekz.: (GHEORGHIU *et al*., 2008);

MODELOJ PRI REFERENCOJ:

Ili devos organiziĝi laŭ alfabeta ordo, alkadrigite, konforme kun la sekvantaj ekzemploj bazitaj sur ABNT. Listigu ĉiujn aŭtorojn de la referencaĵoj. La titoloj de la periodaĵoj devos esti kompletaj kaj ne mallongigitaj.

a) Libroj:

ABRANCHES, S. H.; SANTOS, W. G.; COIMBRA, M. A. **Socia politiko kaj kontraŭbatalo al la malriĉeco.** Rio-de-Ĵanejro: Jorge Zahar, 1994.

ADORNO, T. W. **Edukiĝo kaj emancipiĝo**. Rio-de-Ĵanejro: Paco kaj Tero, 2003.

SPIVAK, G. Kiu rajtpostulas aliulrespektemon? *In*: HOLLANDA, H. B. **Tendencoj kaj malfacilaĵoj**. Rio-de-Ĵanejro: Rocco, 1994. p. 187-205.

b) Artikoloj:

GHEORGHIU, M. D.; GRUSON, P.; VARI, J. "Intergeneraciaj ŝanĝiĝoj kaj konstruado de limaĵoj en la edukaj spertoj de la socia meza klaso". *In* **Edukado kaj Socio**, v. 29, n. 103, p. 377-399, 2008.

VEIGA, L. F.; SANTOS, A. S. "La referendumo pri la armiloj en Brazilo: kampanjaj strategioj kaj la sinteno de la voĉdonanto". *In* **Brazila Revuo pri Sociaj Sciencoj**, v. 23, n. 66, p. 59-77, 2008.

GOMES, L.; CÁRDENAS, C. J.; ALVES, V. P.; LOPES, C. Pripensaĵoj pri la maljuneco kiel montrate en la filmo “Elza kaj Fredo. Iu amo kaj pasio”. *In* ***Acta Scientiarum. Homa kaj Socia Sciencoj***, v. 30, n. 1, p. 25-34, 2008.

c) Interreto:

SILVA, A. O. “Unu rigardo sur la Literaturon: pripensoj pri ĝia politika-pedagogia kontribuo”. *In* Revuo Akademia Spaco, n-ro 91, decembro 2008. Ĝi disponeblas en http://www.espacoacademico.com.br/091/91ozai.htm, aliro en 06.04.2009.

d) Analoj:

CAPORALINI, J. B. “La antropologia problemo en La Nomo de la Rozo”. *In* EKSKURSO PRI ANTIKVAJ KAJ MEZEPOKAJ STUDOJ, 4., 2005, Maringao. **Analoj…**Maringao: Ŝtata Universitato de Maringao, 2005. p. 200-213.

e) Monografio, disertacio aŭ tezo:

SANTOS, V. S. **La docenta perado en la edukado por la kibermedio**. 2007. 179f. Disertacio (Magistreco)-Programo de Postbakalaŭreco pri Edukado, Ŝtata Universitato de Maringao, Maringao, 2007.

Rim.: En la bibliografio devos enteniĝi sole nur la verkoj efektive utiligitaj.

Kondiĉoj por la submeto:

Kiel parto de la procedo de submeto, la aŭtoroj estas devigataj mem kontroli la konformecon de sia submetaĵo al ĉiuj normeroj malsupre listigitaj. La submetaĵoj, kiuj ne estos akordaj kun la normoj, estos redonitaj al la aŭtoroj.

1. La kontribuaĵo estas originala kaj tute nova kaj ne estas taksata por publikado de alia revuo;
2. La dosieroj por submeto estas en la formato de Microsoft Word, OpenOffice aŭ BrOffice (kondiĉe, ke ĝi ne transpasos 5MB);
3. URL-oj por la referencoj estas informitaj, kiam necese;
4. La teksto estas kun interlinia spaco de 1,5cm, utiligas litertipon je 12 pkt kaj uzas kursivajn anstataŭ substrekitaj literoj (escepte pri adresoj URL).

5. La teksto sekvas la modelojn de stilo kaj la priskribitajn bibliografiajn postulojn;

6. La identigo de la aŭtoro de la laboraĵo estas forigita el la dosiero kaj el la fako Proprecaj Informoj en Word, tiel certigante la kriterion pri sekreteco de la Revuo;

7. Se la submetaĵo havas kunaŭtorecon, tiu ĉi ne havas ligitecon de akademia orientado.

Deklaro pri Aŭtorrajto:

La deklardokumento, kies modelo estas malsupre montrita, devas esti presita, subskribita, kun la subskribo(j) de la aŭtoro(j) notarie rekonita(j), skanita kaj sendita al la editoro, per la elektronika adreso jose.provetti@ifpr.edu.br.

DECLARAÇÃO DE ORIGINALIDADE E CESSÃO DE DIREITOS AUTORAIS

Eu, _____, identidade nº _____, CPF nº _____, declaro que o presente artigo intitulado _____ é original, de minha autoria e que cedo todos os direitos de publicação para a Revuo IΦ-*Sophia*, veículo de divulgação e popularização filosófica, científica e tecnológica do Grupo de Pesquisas Filosofia, Ciência e Tecnologias – IFPR.

Afirmo determinantemente que o artigo acima mencionado não foi publicado em qualquer outro periódico nacional ou internacional.

Do acima exposto ratifico e dou fé.

_____

Rimarko.: La Revuo IΦ-*Sophia* adoptas la leĝan praktikon **rajtocedo**n, tio estas, post la publikigo estas libera la reprodukto sen komercaj celoj, kondiĉe ke la aŭtoro kaj la fonto estu menciitaj kaj ke tiu ĉi noto estu inkludita.

Politiko pri Privateco

La nomoj kaj adresoj menciataj en tiu ĉi Revuo estas uzataj ekskluzive en la

servoj faratajde tiu ĉi publikaĵo, ne estante disponigataj por aliaj celoj aŭ al aliuloj.

Patronado de la Revuo:

- JPJ Editoro.
- Esploro grupo Filozofio, Scienco kaj Teknologio – IFPR;
- Bakalaŭruloprogramo en Filozofio Majstro Profesia – UFPR;
- Federacia Instituto de Edukado, Scienco kaj Teknologio Paranao - IFPR - Assis Chateaubriand
- Grupo Pri Filozofiaj, Sciencaj kaj Teknologiaj Esploroj – IFPR